# EKO 2023

Pensu globe
Agu loke
Por la landa,
Fakaj kaj
Regiona
Laboro

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj

Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj,
Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

**EKO 2023 / 14  Marto 4, 2023**

**Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK**


## Alvoko de UEA kaj EEU pri eŭropa renovigo

La jaro 2023 jam firme komenciĝis kaj do la eŭropa komisiono de UEA kaj EEU opinias, ke ni devas intensigi niajn klopodojn por realigi la labor-planon, kiun ni donis al ni, kiun vi povas legi en https://uea.org/vikio/E%C5%ADropa_Komisiono_(EKU)#Laborplano_por_2022-2023 kaj kies ĝeneralaj celoj estas la jenaj:

1. Retaj kursoj pri Esperanto en ĉiu eŭropa lando en la landaj lingvoj
2. Informi pri Esperanto EU-instancojn kaj eŭropanojn kaj verki tiucelajn informilojn
3. Labori por ke la ŝtatoj deklaru Esperanton parto de sia nacia kultura heredaĵo
4. Mezeŭropa Regiona Kunlaboro kaj Balkana Regiona Kunlaboro
5. Eŭropa Kongreso de Esperanto en 2024 en Stasburgo
6. Fronti la akutan bezonon pri generacia rejunigo tra Eŭropo

Ni bezonas vian helpon por plene realigi ĉiujn punktojn. Sen via helpo neniu centra eŭropa organizaĵo povas atingi ion . Tute aparte ni volas kuraĝigi vin lanĉi en via lando inform-kampanjon al viaj samlandanoj sub la slogano "Esperanto por multlingva Eŭropo" interalie por forigo de la danĝera ideo, ke ni volas per Esperanto forigi naciajn lingvojn. Samtempe ĝi kompreneble estos ĝenerala informa kampanjo pri Esperanto. Ni bezonas redoni al la eŭropa Esperanto-movado la saman entuziasmon, kiun ĝi havis en la pasinteco, ĉar Esperanto estas eŭropa donaco al la mondo.

Seán ÓRiain, prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio
Rento Corsetti, kunordiganto de la komisiono pri Agado en Eŭropo de UEA

## Universitata grupo en Bruselo

La 15-an de februaro 2023 12 personoj  el ULB (Brusela Libera Universitato, franclingva), -el VUB (Brusela Libera Universitato, nederlandlingva) kaj - el EBG (Esperantista Brusela Grupo).

Tiuj kunvenis en VUB je invito de Kristin Tytgat (VUB). La gvidanto de la renkontiĝo estis Adam Brooking, iama VUB-studento kaj nuna instruisto de Esperanto en EBG. La duono de la grupo konsistis el junaj studentoj. Ili konatiĝis dum la lasta IJK en Nederlando. Inter ili plej aktivas Atiljo, juna inĝeniera studento de ULB. La komuna lingvo inter la ĉeestantoj estis Esperanto.

Dum la kunveno okazis la fondo de universitata Esperanto-grupo de la du universitatoj. Ĝia nomo estos KLUBO, akronimo de Klubo de la Libera Universitato de Bruselo. LUBO estas vorto por ULB kaj VUB.

**Celo de Klubo:**

1. Disvastigi la lingvon en ambaŭ universitatoj: organizi lingvokursojn, prelegojn, enkondukojn kaj babiltablojn.
2. Agadi ekster la universitato: organizi fulmkursojn en bazaj kaj mezgradaj lernejoj.
3. Sentemigi homojn al lingvokulturaj problemoj kaj lingvaj rajtoj.
   Interesa temo en la multlingva urbo Bruselo kaj studobjekto en VUB.
4. Organizi kulturajn interŝanĝojn pere de Esperanto: eble en Erasmus+projekto
5. Organizi studentajn kantvesperojn, renkontiĝojn pri folkloraĵoj, dialektoj ktp.

La venonta kunveno okazos en ULB la 15an de marto 2023. La Klubo jam havas kluban kanton kaj kluban krion.

Kristin Tytgat (20 februaro 2023)

## Rusiaj esperantistoj organizas sin

De la La 14-a ĝis la 23-a de aŭgusto 2023 en Rusio apud la urbo Kazanj (respubliko Tatarstano) okazos Rusiaj Esperanto-Tagoj - 2023 (RET-2023): https://reu.ru/kalendaro/informletero/RET-2023

Vladimir MININ

## Franca kurso

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: Lycée Victor CONSIDERANT
Gvidantonomo: DESBRIERES Emmanuel
Tipo: Nova lerneja kurso
Loko:: Salins-les-Bains, Francio

Aldoninto: Flavavulpo
Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27518

## AMINDA denove venas el Madagaskaro

Tiu ĉi-ELSENDO N° 128 estas la lasta podkasto 30-minuta ĉar la venontaj dissendoj daŭros per 20-minuta ligo. El la malagasa historio pri la hegemonio de Sakalava --- la duan parton de tiu artikolo vi povas sekvi en la venonta podkasto. Cetere, ni proponas al vi kelkajn novaĵojn pri Malagasio dum la kuranta monato sen forgesi la kutiman Esperanto-kanton kaj la lecioneton pri la malagasa lingvo. Aminda Radio Esperanto bonvenigas viajn komentojn kaj bondeziras al vi ĉiuj agrablan aŭskultadon !

https://youtu.be/WOgIvKeT96s

# Programo AMO 99 anoncita




Tuj okazos ĉi tiu seminario, laŭ la apuda skemo.

Nia unua AMO-seminario en Ĉeĥio. Jen la programo anoncita de IFEF kaj la projekto Verden kun forta partoprenantaro el pluraj landoj.

# Kiel ILEI povas helpi al lerneja agado?

Kion bezonas lernejaj instruistoj (jam ILEI-membroj, ne ankoraŭ ILEI-membroj, eĉ ankoraŭ ne esperantistoj) por enkonduki, instrui, utiligi Esperanton en lernejoj, interalie kiel nedevigan fakon ekster la oficialaj lernhoroj? Kiel Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) povas helpi al lernejaj instruistoj?

**Rimarkoj, ideoj, proponoj… bonvenas! Ankaŭ sendu la alvokon al instruistoj, kiujn vi konas, eĉ se ili ankoraŭ ne estas esperantistoj!**

Povas temi pri materialo por prezenti, instrui, utiligi Esperanton, instigi lernejanojn lerni, uzi Esperanton… aŭ pri helpiloj al instruistoj, sistemo por dividi spertojn… pri ĉio ajn kio povas helpi al Esperanto-agado en lernejoj. Ni pensu ankaŭ pri la bezonoj de instruistoj kiuj ĵus komencis lerni la lingvon aŭ ankoraŭ ne komencis lerni ĝin.

Eblas ankaŭ komenti la utilecon de la nunaj servoj de ILEI (retpaĝaro, revuoj, interna kaj ekstera komunikado, kunvenoj, kongresoj… ĉu retaj, paperaj, fizikaj) kaj proponi evoluon por ke ili pli bone utilu, kaj ankaŭ proponi novajn servojn.

**Didier Janot, Francio**

# Multlingvismo en UN raportata ekde nun

La 21-an de februaro (la Tagon de la Gepatra Lingvo), Unuiĝintaj Nacioj lanĉis novan eldonaĵon en la angla: *Multilingualism at the United Nations*:

https://www.un.org/en/delegate/dag-hammarskj%C3%B6ld-library-explores-multilingualism-un

Vi povas legi la plenan tekston en la ses oficialaj lingvoj de UN ĉi tie:

https://www.un.org/en/library/whyitmatters

Tiu ĉi novaĵo reprezentas signifan progreson.  Jam delonge UEA, kunlabore kun la Studgrupo pri Lingvoj kaj la NRO-Komitato pri Lingvoj, laboris por konsciigi UN pri la praktika neceso agnoski lingvan diversecon kaj kondamni lingvan diskriminacion. Tiurilate, nia pozicio koincidas kun tiu de la Ĝenerala Sekretario mem, kiu klopodas disvastigi la mesaĝon de UN en lingvoj kiujn la homoj komprenas.  UEA kompreneble argumentas, ke necesas ne nur paroli sed ankaŭ aŭskulti tiujn homojn pere de la lingvoj kiujn ili parolas – kaj ankaŭ pri la valoro de Esperanto kiel neŭtrala lingva rimedo nediskriminacia.  La fakto, ke UN almenaŭ komencas konsciiĝi, ke ĝi entute havas lingvan problemon (alian ol la elita kredo, ke pli da homoj parolu la anglan…), estas bona komenco en longa vojaĝo…

Humphrey  Tonkin

## Dek du rakontoj de Viana

Nova senpaga libro. — En februaro 2023 en la Virtuala Biblioteko de “Sezonoj” aperis nova bitlibro: “Dek du rakontoj” de la brazila aŭtoro Paulo Sérgio Viana. Ĉiu deziranto povas senpage elŝuti ĝin laŭ la normoj “pdf” (por komputilo) kaj “ePub” (por librolegilo kaj saĝtelefono). Legu pli en la novaĵretejo ‘La Ondo de Esperanto’ https://sezonoj.ru/2023/02/viana-7/

## Kongresanoj por Torino

Je la 1a de marto al la 108-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 2023 en Torino (Italio), aliĝis 818 personoj el 52 landoj. Dum februaro estis registritaj 46 novaj aliĝintoj. >

========= vortoj:  1065 =========

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj.  Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis majo **2022** (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.